



Esperanto en Danio

20-a jarkolekto • n-ro 4 • novembro 2013



Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Peter Wraae

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresânĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.02.2014

Enhavo

Movadaj dilemoj.....	3
Tago de Unuiĝintaj Nacioj.....	4
EEU-kongreso en Rijeka 2014.....	5
Jerzy Fornal (1926 - 2013).....	7
Pri plano plenumita.....	9
Kopenhagaj okazontaĵoj.....	11
Pola vizito.....	12
Biblioteka kresko.....	12
Ni iru al la Esperanto-urbo.....	13
Lernu.net-kurso	14
Malfeliĉa situacio de kuraĝa familio.	15
Nova direktoro en Vieno.....	16
Nova prezidanto de la Akademio.....	17
Universitata filmita kurso en Esperanto.....	18
Deziras korespondi.....	19
La patro de la dana Esperanto- movado.....	20
7-a Mezorianta Esperanto-Kunveno.	22
Mendo de revuoj por 2014.....	23

Movadaj dilemoj



UEA jam delonge plendas pri la malkresko de la membraro, kaj ŝajnas ke la nova estraro konsciante tiun fakton, alvenos kun proponoj kiamaniere kreskigi la nombron de individuaj membroj. La afero estas grava unue pro la fakto ke nia movado tute ne estas apogata finance de ekstermovadaj organizoj, nur de la membrokotizoj kaj eventualaj donacoj. Ni povis konstati tion dum la lasta kunsido de la komitato de UEA,

kiu decidis tamen apartigi sufiĉe grandan sumon por fari novan modernan hejmpaĝon, eĉ se samtempe la CO ne povas anstataŭigi la postenon de unu el siaj oficistoj kiu fine de la jaro emeritiĝos.

Dum la lastaj jaroj ankaŭ DEA konstatis stagnon kaj eĉ ke nia membraro malrapide malkreskas: maljunuloj fidelaj al la Movado iom post iom formortas kaj junuloj ofte preferas aktivigi ne membriĝante al iu societo, pro la fakto ke oni povas facile uzi la reton por kontaktoj. Tio estas iom danĝera evoluo ĉar same kiel UEA, la landaj asocioj kaj la diversaj lokaj kluboj dependas entute de la kontribuo de la membroj kaj de ilia kotizo. Por esti videblaj al la ekstera mondo kaj allogi novajn homojn al lernado ni bezonas elmontri nin, kiel ni faras ankaŭ ĉi-jare partoprenante en la Librofoiro de Kopenhago, kaj en aliaj foiroj dum la jaro.

Ni daŭre aranĝas kursojn por komencantoj en diversaj lokoj, sed ofte kursanoj malaperas kaj ne eniras la movadon. Esence laŭ mia sperto estas ke la lernanto iru al iu tutsemajna internacia aranĝo post la kurso, alie estas ofte vana laboro. Do, necesas nekredbla energio kaj ankaŭ oferto de monhelpo precipe al junuloj, por ke ili spertu internacian etoson kaj agnosku la grandecon de la Movado.

Interese estas ankaŭ la konstato ke dum la lastaj jaroj estas pli kaj pli da ofertoj pri kongresoj, seminarioj kaj feriaj renkontiĝoj en diversaj landoj kaj kontinentoj, dum la nombro de aliĝintoj al la Universala Kongreso falas. Ekzemple antaŭe la landoj kiuj gastigis la UK povis atendi eblan finanĉan gajnon, sed tio fariĝis maloftaĵo kaj ekzemple en Kopenhago mankis kelkcentoj da partoprenantoj por ne havi deficiton, kiun feliĉe

UEA eltenis, sed kiom longe UEA povos fari tion?

Jen gravaj dilemoj kiuj fariĝas pli kaj pli videblaj, pri kiuj ni devas diskuti kaj decidi pri solvoj.

Ĉar la venonta UK okazos en alia kontinento, kaj tradicie ne multaj eŭropanoj ĉeestos, Eŭropa Esperanto-Unio decidis kongresi venontsomere en Kroatio. Mi varme rekomendas partopreni tiun kongreson, kiu okazos de la 6a ĝis la 12a de julio en ege interesa urbo Rijeka (cetere mia naskiĝurbo) de kie oni interalie povas fari ekskursojn al belegaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo.

Ĉar ĉi tiu numero estas la lasta antaŭ la jarfino, mi kaj la estraro de DEA deziras al vi ĉiuj feliĉajn jarfinajn festotagojn, esperante ke vi daŭre apogos nian laboron, ĉar ni forte bezonas tion!

Ileana Schrøder



Tago de Unuiĝintaj Nacioj

La 18-an de oktobro la asocio K.U.K.S. (Komiteen for Udlandsforeningers Kulturelle Samvirke) al kiu ni membriĝis ĉi-jare, aranĝis internacian festivalon por festi la tagon de la Unuiĝintaj Nacioj. La evento estis aranĝita en la halo de la Urbodomo de Kopenhago kun la partopreno de 32 ambasadoj kaj riĉa kultura programo. Jen unu ĉarma grupo de Rusio.

EEU-kongreso en Rijeka 2014

Jen la alvoko de Seán O Riain, prezidanto de EEU:

Elkore mi invitas vin al la 10-a kongreso de EEU en Rijeka, Kroatio, kiu okazos de la 6-a ĝis la 12-a de julio 2014. Kroatio estas la plej nova membroŝtato de EU kaj havas verŝajne la plej fortan tradicion de Esperanto inter ĉiuj EU membroŝtatoj. La jugoslavia prezidento Tito, kroato, parolis Esperanton, kaj aŭspiciis UK-on en Zagrebo en 1953 kaj kroata prezidento Stjepan Mesić aŭspiciis UK-on en Zagrebo en 2001. En Kroatio esperantistiĝis esperantistaj famuloj kiel Ivo Lapenna kaj Tibor Sekelj kaj de tie devenas multaj aliaj gravaj agantoj por la internacia Esperantomovado. De tie devenas Zagreba Metodo de instruado de Esperanto, 90% de teatraj aktivadoj en Esperanto kaj granda daŭra informado pri Esperanto al la ĝenerala publiko.


Dum 2013 en Bruselo estis interesa ekspozicio fikcia pri la eksplodo de EU en 2018 kun subtitolo “La Lastaj Jaroj de la Longa Paco 1945-2018”. Kvankam la flandra artisto kiu konceptis kaj preparis la ekspozicion, Thomas Bellinck, estas ne-esperantisto, la ĉefa lingvo de ĝi estis Esperanto. Ĝia ideo estis ke EU eksplodis ĉar la junularo, kiu eĉ ne povis imagi militon en Eŭropo, pli kaj pli voĉdonis por ekstremaj naciistaj partioj, kiuj tiris

Eŭropon en novan grandan militon. Post tiu milito, pli da homoj fine komprenis la neceson de politika integriĝo en Eŭropo, kaj de neŭtrala lingvo por finfine garantii la pacon. Pensiga ekspozicio por sproni viglan debaton dum la kongreso en Rijeka!

Krom tio atendas vin viglaj diskutoj pri la plej efika maniero antaŭenigi Esperanton en la 28 membroŝtatoj de EU, atendas vin aro da kulturaj programeroj en la bela ĉemara urbo Rijeka kiel teatraj spektakloj, koncertoj, poeziaj vesperoj, libroprezentoj. Kompreneble en tia bela ĉirkaŭaĵo, en unu el la plej famaj turismaj regionoj de Kroatio, atendas vin ankaŭ pluraj ekskursoj, ĉe-maraj kaj montaraj.

Venu kaj kontribuu, ĝuu kaj lernu!





Rijeka estas urbo situanta en la norda parto de la kroata adriatika marbordo. Ĝi estas la ĉefa havenurbo kaj la tria urbo laŭ grandeco en Kroatio, havante ĉirkaŭ 140.000 loĝantojn. Ĝi situas en grava loko kie la Adriatika maro plej multe eniras la Eŭropan kontinenton, pinte de la Kvarnera golfo. Pro tio la riĉa historio de la urbo estas ligita al maro. La urba ekonomio grandparte dependas de la mara trafiko kaj ĝis antaŭ nelonge de ŝip-konstruado. Intertempe ĉiam pli

ankaŭ de turismo. Tamen la plej esenca por la urba historio estis ĝia haveno kiu dum la tuta aŭstro-hungara periodo ekde la 15-a jarcento estis la dua plej grava haveno de la tuta aŭstro-hungara regno kaj tiel en la 19-a jarcento estis unu el la dek plej grandaj havenoj de Eŭropo. El tiu tempo devenas ankaŭ la tipa konstrustilo de la aŭstro-hungara monarkio, netipa por kroata marbordo.

En la urbo videblas influoj de multnombraj kulturoj kaj nacioj. Rijeka ankoraŭ hodiaŭ estas urbo de toleremo kaj kunvivado, la urbo en kiu bone vivas pli ol 10 naciaj minoritatoj.



Opatija apud Rijeka

Pli da informoj:

www.europo.eu kaj

<http://eeu-kongreso.webnode.com>.

Jerzy Fornal (1926 - 2013)

La 31-an de aŭgusto atingis Jerzy Fornal la lastan momenton de sia laboro en tiu ĉi mondo. Post sia multjara kaj altkvalita prezentado de diversspecaj unupersonaj prezentadoj, li trankvile endormiĝis en Varsovio en ĉeesto de sia filino Tamara. Li pasigis sian lastan tempon en la vivo kun sia filino, kiu multon faris por faciligi lian vivon post la morto de Zofia Banet Fornalowa, kiu subite forlasis nian mondon la 19-an de septembro 2012. Tio estis forta bato al ili ambaŭ.

Jerzy Fornal prezentis sian repertuaron en pluraj landoj de la mondo. Dum pluraj jaroj ekde la 1980-aj jaroj li kaj la verkisto Harold Brown travivis grandan ĝojon renkontiĝi kaj kunlabori. Ili ofte diskutis pri Esperanto-teatro kaj pri sia propra kuna laboro. Ili forte fekundigis la idearon kaj pensojn unu de la alia. Mi, kiu kunvivis kun Harold Brown kaj kiu aranĝis plurajn turneojn en Svedio por Jerzy Fornal, ofte renkontis ilin kune kaj povis aŭskulti ilian gajan kaj kreivan interparolon pri ĉio de la monda literaturo ĝis la maniero plej bone substreki kaj montri iujn detalojn en ilia propra laboro. Estis feliĉaj momentoj aŭskulti la du inteligentajn kaj kreivajn “kulturlaborantojn” naski novajn ideojn kune. Ili estis kiel du knabetoj ludantaj feliĉigajn ludojn, kiuj multe riĉigis la esperantan teatron kaj la esperantan kulturon. Mi esperas, ke ni ĉiuj, kiuj havis la bonŝancon travivi iliajn kreaĵojn por ĉiam portos tion en niaj koroj.

En Högsby/Oskarshamn, kie loĝis Harold Brown, estis prezentitaj du premieroj: “EDUKO DANĜERA”, kiu pere de eventoj dum la franca revolucio, kiu tiam 200-jariĝis, montras ke la sinteno de la homo ne ŝanĝiĝas, kiam la jarcentoj ŝanĝiĝas; “VAGABONDO”, kvazaŭ-biografia prezentado, surscenejiĝis unuafoje en 1992 dum la Kultura SEF-kongreso en Oskarshamn.

“VAGABONDO”-n Jerzy Fornal prezentis lastan fojon ĉe la entombiga ceremonio de Harold Brown. Oni ŝoke travivis kiel la akso de la vivo



JERZY FORNAL - la lasta el la famaj, profesiaj aktoroj, kiuj laboris pri la Esperanto-teatro

rompiĝis. Eĉ homoj en la publiko, kiuj ne komprenis Esperanton, venis plurfoje dirante kiel ili ŝatis kaj “komprenis” la prezentadon. Tio klare montras la altan kvaliton de lia laboro.

Famis la prezentado de “ANIARA”, verkita de Nobelpremiito Harry Martinsson, tradukita de William Auld kaj Bertil Nilsson, kaj aranĝita por Jerzy Fornal de Gunnar Gällmo. Tiu teatraĵo priskribas kiel oni jam en la 1950-aj jaroj vidis nian mondon senspire ŝanĉeliĝadi en la Universo. Vidante Jerzy Fornal prezenti ĝin oni vere travivis la lastajn horojn de nia mondo.

Fragmento el recenzo de “ANIARO” en DEFA-Bulteno (Danio), n-ro 9 1987:

... Neniam oni aŭskultis tiom da esperantistoj diri absolute nenion dum tiom da tempo. Neniam oni aŭskultis tian esprimriĉecon, tian precizecon, tian voĉon kiel ĉe Jerzy. Ĉiuj estis tute kaptitaj de la alta arto, kiu plenigis la ĉambron, – kiam la prezento finiĝis, ni apenaŭ kapablis reveni al la “ordinara” mondo, sed volis resti en la mondo, kvankam kruela kaj timiga, kiun Jerzy vivigis antaŭ niaj okuloj. Tre intima estis la travivaĵo, ĉar la “scenejo” estis tiel malgranda kaj la aktoro estis tute proksima al la publiko. Koregan dankon al Jerzy por tiu elstara vespero...

Fragmento el enkonduko de Harold Brown al la programo de "VAGABONDO", 1992:

... Koncize dirite “Vagabondo” esprimas la ideon pri rajto de homo al alternativa vivo, eĉ kiam ĝi ne alportas feliĉon, sed tamen donas senton de libereco. Malgraŭ saturanta ĝin per tristo “Vagabondo” enhavas radion de optimismo, ĉar ja ĝia heroo havas ideon; li volas semi plantojn sur betonaj aŭtoŝoseoj, kaj agante laŭ la Zamenhofa fido... eĉ guto malgranda konstante frapante traboras la montan graniton - esperas fari ion bonan, pozitivan...

“Mi memoras kaj ofte pensas pri kiam vi kaj Harold vigle interparolis pri diversaj eblecoj de Esperanto- teatro. Salutu Harold de mi, kiam vi renkontos lin kaj vi ambaŭ sidos sur la arĝenta rando de la nuboj denove parolantaj pri esperanto-teatro!” – “Daŭrigu sur la nuboj vian gajan interparolon, vian kreivan kunlaboron por esperanto-teatro. Ne ripozu en paco! Vivu kune en ĝojo! NI MEMORU VIN!”

Kerstin Rohdin, (Svedio)

Pri plano plenumita

CARL NIELSEN



Mia Fuena Infanaĝo

La frontpaĝo de la nova libro

Kvankam oni rememoras Carl Nielsen (1865 – 1931) pro lia grandega talento kiel komponisto, li estis ankaŭ kapabla kaj diligenta verkanto, kies verkaro inkludis ne nur la libron *Min Fynske Barndom* (Mia Fuena Infanaĝo) de 1927, sed ankaŭ la eseeron *Levende Musik* (Vivanta Muziko) de 1925 kaj la post-mortajn eldonaĵojn de eroj de liaj taglibroj kaj korespondaĵoj de 1954 kaj 1983. Lia talento kiel verkanto estis agnoskita kiam Dana Verkista Asocio bonvenigis lin kiel membro. En la jaro 1994 Erik Clausen instrukiis la filmon *Min Fynske Barndom* parte laŭ la enhavo de la membiografio.

Antaŭ jaro oni retrovis manuskripton malnovan. Ĝi estis la Esperanta traduko de la membiografio de la komponisto Carl Nielsen – Mia Fuena Infanaĝo. La tradukanto estis la fuena esperantisto Erling Windeballe (1908 – 2004), kiu komencis traduki la libron iam en la fruaj 1990-oj. Li plenumis la tradukon, oni lingvaĵe kontrolis ĝin, sed bedaŭrinde la libron oni neniam eldonis. Interese estas, ke krom la Esperanta traduko de Erling Windeballe, ekzistis nur angla traduko de la verko, (Reginald Spink 1953).

Novembre 2012 Jens S. Larsen kaj mi ricevis la manuskripton de nia kolegino Jytte Sunekær, kaj ekkonsciante pri ĝia valoro ni decidis, ke ni nepre ciferecigu kaj redaktu la manuskripton celante ties eldonado. Ĉu la vorto ‘valoro’ estas aŭdace troa takso?

Nu, la komponaĵoj de Carl Nielsen ofte estas ludataj ne nur en Danio, sed ankaŭ tra la tuta mondo precipe en Finnlando, Germanio, Hispanio, Svedio, Britio kaj Usono (laŭ la anglalingva Vikipedio). La spertoj

infanaĝaj multe influas la plenkreskan agadon, sukceson aŭ malsukceson, tial la membiografio pri la infanaĝo valoras al tiuj, kiuj volus pli bone kompreni kaj aprezi la muzikon de Carl Nielsen. Plue legante la libron ŝatantoj de historio lernas ne nur pri la evoluo de komponisto oni ankaŭ lernas pri la tiama vivmaniero kamparana.

La membiografio temas pri la jaroj ekde de la naskiĝo en la jaro 1865 de Carl Nielsen en la vilaĝo Nørre Lyndelse ĝis lia forveturo al Dana Reĝa Konservatorio en Kopenhago en la jaro 1884.

Carl Nielsen estis la sepa de dek du gefiloj de malriĉaj sed muziktalentaj gepatroj; la dommastrumanta patrino estis ĉiam kantema kaj la patro estis libertempe vaganta popolmuzikisto. Sian unuan sperton pri la violono Carl Nielsen ricevis kiel etulo kiam li malsaniĝis pro la morbilo. Poste li estis instruata de vilaĝa violonisto. La tradukanto Erling Windeballe antaŭparole informis:

Kiel knabo li ofte piediris kun sia patro kaj aliaj muzikistoj al aliaj vilaĝoj por ludi okaze de geedziĝaj kaj aliaj festoj. Post la konfirmacio Carl Nielsen fariĝis lernanto ĉe butikisto en Ellinge vilaĝo situanta iom proksime al Nyborg. Sed li ne ŝatis sian laboron tie, kaj ĉar la butikisto bankrotis, li devis foriri de Ellinge. Kvankam Carl Nielsen havis nur 14 jarojn, li sukcesis ekhavi postenon kiel trumpetisto ĉe la militista regimento en Odense, kaj tiel li restis, ĝis li havis 18 jarojn. Tiam li iris al Kopenhago, kie li estis akceptita kiel lernanto en la Reĝa Dana Konservatorio.

Nia celo estis la eldonado de la traduko de Erling Windballe, kaj antaŭ nelonge la libron eldonis DEA. Sciante ke eĉ fervoraj esperantistoj estas ne plu tiel legemaj kiel antaŭe, DEA singarde eldonis nur 50 ekzemplerojn.

La belaspekta libro havas 180 paĝojn. La literoj estas grandaj kaj la prezo estas malgranda – 100 kronoj. Gvidantoj de studgrupoj eble volus proponi ĝin al siaj grupanoj. Nia granda espero estas, ke multaj el vi legu la libron kun granda plezuro, kaj post la legado vi (bonvole) sendu al ni viajn reagojn. Certe la redaktoro de Esperanto en Danio bonvenigus recenzojn pri la libro por inkludado en la venonta numero de la revuo.

Betty Chatterjee

Kopenhagaj okazontaĵoj

Ĉiuj kunvenoj de Konversacia Esperanto-Klubo, Kopenhago, okazas en la Kulturdomo, Tomsgårdsvej 35, 2400 København NV, ekde la 19-a ĝis la 21-a horo. – Prezidanto kaj kontaktulo: Peter Wraae, telefono +45 6070 7969, retpoŝto peter@wraae.dk.

4.11 Bent Jensenius: Vojaĝo unudirekta.

www.esperanto.be/fel/2010/009989.php

Bona bazo por diskutoj pri spacvojaĝo kaj simile.

N.B. Ĉiuj estas bonvenaj. Tiuj kiuj ne havas la tekston ricevos ĝin surloke.

11.11 Historia vespero. Ni invitas ĉiujn rakonti ian historion de nia vivo. Eble vi skribos ion Esperante ?

18.11 Numerludo.

25.11 Bent Jensenius gvidos: Kion diris sinjoro Kabe?

www.esperanto.org/Ondo/H-kabe.htm

Intervjuo kun Kabe en kiu li i.a. diras kial li kabeis. Bona bazo por diskutoj pri nia lingvo.

N.B. Ĉiuj estas bonvenaj. Tiuj kiuj ne havas la tekston ricevas ĝin surloke.

2.12 Ana Røssum prezentos ion. Pliaj informoj sekvos.

9.12 Ni faros kristnaskan bonetoson.

14.12 Zamenhofvespero.

Ni kunvonos por trinki kafon/teon kaj manĝi kukojn. Krome estos prezento de la libro “Mia fuena infanaĝo”, kiu ne povis okazi en oktobro pro la ŝtormo. Ni esperas ke venos gastoj el Svedio.

Ĝis revido la 6-an de januaro – informoj pri la unuaj venontjaraj kunvenoj sekvos poste.

Pola vizito



La pola popoldanca grupo *Sadeszanie* partoprenis la muzikan festivalon en Ballerup fine de aŭgusto dank'al mia kunlaboro kun ambaŭ organizoj. Gvidis ilin fervora esperantistino Halina Komar, kiu dum antaŭaj jaroj estis la landa prezidanto de Pollando. La festivalo okazis dum belega vetero, kaj la danaj organizantoj kaj la partoprenantoj de la festivalo estis ege kontentaj kun la prezentado de polaj popoldancoj kaj kantoj. Kelkaj el niaj membroj ĉeestis ankaŭ la eventon.

Ileana Schrøder

Biblioteka kresko

Peter Weide informas ke granda parto de la privata librokolekto de Gustav kaj Bodil Kühlmann, kiu ne havas hejmon post la forpaso de Bodil, nun havas hejmon. Prof. Hartmut Haberland de la universitato de Roskilde facile konsentis ke inter la libroj estas iuj kun ligo al la dana/skandinavia kulturo, kiujn perdi estus granda damaĝo. La biblioteko (konsultebla ĉe <http://rub.ruc.dk/>) transprenis du pakkestojn kun entute pli ol cent libroj.

Ni iru al la Esperanto-urbo Ekskurso al Herzberg 28.05 – 01.06.2014



Post la legado de mia artikolo – (nu, ĉu vi legis ĝin?) en la lasta numero de Esperanto en Danio vi scias, ke mi raviĝis pri mia vojaĝo al Herzberg. Tial Peter proponis al mi, ke mi aranĝu printempan vojaĝon al Herzberg. Mi tuj jesis, ĉar Herzberg estas ĉarma urbo, la ĉirkaŭa kamparo estas belega kaj plej grave, tie estas burĝonanta Esperanto-urbo.

Kiel ni veturos tien?

Nu, tio dependas de tio kiom da aŭtanoj partoprenos. Ĝis nun 5–6 membroj intencos partopreni, kaj du el ili posedas aŭtojn. Tial 8 personoj povos per aŭto vojaĝi al Herzberg. Tamen ĉu ne estas aliaj klubanoj, kiuj estante aŭtanoj volus viziti Herzberg? Imagu kvin aŭtojn signifus dudek sidlokojn kaj malaltajn elspezojn por benzino.

Se ne estos sufiĉe da aŭtoj, oni povos mem aranĝi sian vojaĝon per trajno uzante la jenan ligilon: <http://reiseauskunft.bahn.de>

Kie ni tranoktos?

En Hotel Zum Pass en la ĉarma vilaĝo de Siebe proksime al Herzberg. Tie kiel grupo ni povos tranokti komforte kaj malmultekoste. Teresa Liberska informis min jene:

Prezo de nia hotelo estas: por grupo 30 € 1 nokto kun matenmanĝo por 1 persono.

En la hotelo, plej multe estas 2 personaj ĉambroj, kiuj kostos 60 €.

Ĝenerale la hotelo povas akcepti samtempe 20 personojn.

Ni povos manĝi kontraŭ moderaj prezoj:

Se estas grupo oni povas mendi varman vespermanĝon (saman

manĝaĵon por ĉiuj grupanoj) je la favora prezo 10 € (supo, ĉefa plado (vianda aŭ por vegetaranoj: legoma), kaj por trinki akvon kun citrono.

Pliaj informoj pri la hotelo kaj ties bona restaŭracio legebla jene:

www.hotel-zumpass.de.

Atentu! Ne troviĝas lifto en la hotelo.

Pri la enhavo de la programo:

Mallonge: turismado, klerado, distrado kaj ripozado.

Turismado: Zsofia Korody pretos aranĝi iom da turismado en Herzberg kaj la ĉirkaŭaĵoj.

Klerigado: Inter la 30-a de majo kaj la 1-a de junio okazos la 63a Studsesio (klerigado, studmodulo) en Interkultura Centro Herzberg. La studsesio estas senpaga, SED nome de Interkultura Centro Zsofia kaj Peter bonvenigos libervolajn mondonacojn.

<http://esperanto-urbo.de>, alklaku “Programoj 2013-2014”.

Distrado kaj ripozado: Promenadoj en la arbaro, sprita babilado en la hotelo vespere trinkante bieron aŭ limonadon ktp.

Bonvolu anonci vin antaŭ la 1-a de decembro.

Bone estus ekscii, proksimume kiom da personoj volos partopreni la aranĝon.

1. Bezonataj informoj:Kiom da personoj?
2. Ĉu vi havas aŭton?
3. Ĉu vi estas vegeterano/vegano/viandmanĝanto?

Lernu.net-kurso

Pasintfoje mi klarigis, kiel gramatiko kaptis mian atenton. Mi daŭre tie tradukas, atingis la procenton de 80%, nun restas 5-ono por finfari. Se vi enrigardas kaj trovas erarojn, estas tre facile por vi helpi kaj fari komenton al la sistemo.

La nova aranĝo ankoraŭ ne estas publikigita. Ni ja ne finis. El la 62 lingvoj nur 40 vere funkcias.

Se vi emas helpi, vi ensalutu la danan paĝon, vi rigardu la kolonon “Nyt i

Esperanto-bevægelsen”. Inter la diversaj informoj vi trovu “Oversæt det nye lernu! til dit sprog”, kie estas klarigo pri kiel fariĝi tradukanto. Vi nun povas vidi pli grandan parton de la sistemo.

Estas alia farenda traduk-tasko sub lernado. Tie estas nova 26-leciona kurso kun dialogoj. Certe ĝi estas tre taŭga – aktuale aranĝita de spertuloj. Por profiti de tiu enkomputiligita aranĝo, ni traduku al la dana – por doni eblecon al eventualaj lernantoj. Ĉe la plej multaj lingvoj tio jam okazis. Venu volontuloj, ĉar, kiam mi finas la tradukon de la detala gramatiko, mi celas unue kontroli mian tekston. Kaj tio povas daŭri longe, kiel vi spertas.

Jytte Sunekær

Malfeliĉa situacio de kuraĝa familio

Tiu temas pri la sorto de kvar persona familio esperantista, kiu iam loĝis en Pakistano. La edzo estis juristo kaj ĵurnalisto, kies ĉefa intereso estis pri homrajtoj. Pro tio islamistoj mortminacis lin, kaj la polico faris nenion. Tial ili fine de aprilo fuĝis al Nepalo, kie ili turnis sin al Alta Komisaro de la Unuiĝintaj Nacioj pri Rifuĝintoj (UNAKR) petante agnoskon kiel rifuĝintoj. La respondeculo informis ilin, ke post ĝisfunda esploro oni decidis la aferon. Tamen kiel azilpetantoj ili nek rajtas perlabori monon nek ricevi subvencion de UNAKR. Nur post eventuala positiva decido ili ricevos monhelpon. Post ses monatoj la familio ankoraŭ atendas la decidon de UNAKR. Intertempe la edzo kaj lia filino ege diligente helpas Nepalan Esperantistan Asocion per instruado kaj prizorgo de ĝia biblioteko.

Per sia optimismo kaj diligenta laboro li sukcesas savi sian bonhumoron. Sed eĉ la plej granda optimismo ne vivtenos la familion ĝis UNAKR decidis pri ilia sorto. Kelkaj el ni jam sendis al la familio monhelpon, kaj ni daŭre helpas ilin laŭ niaj kapabloj.

Pliaj donacoj estos ege bonvenaj. Se vi havas demandojn mi estas je via dispono. Telefone 42 21 19 72 aŭ retpoŝte bettychatterjee68@gmail.com.

La kontonumero estas: 0274 4594366565 (Esperanto Hjælp).

P.S. Laŭ Kim Henriksen, la edzo iam vizitis Kopenhagon, kaj tiam li diligente helpis al KEK.

Betty Chatterjee

Nova direktoro en Vieno



La direktoro de la Literatura Arkivo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, privata docento doktoro Bernhard Fetz, transprenis je la 1-a de aŭgusto 2013 ankaŭ la direktorecon de la Kolekto por Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko. En tiu funkcio li sekvas kortegan konsiliston magistron Herbert Mayer, kiu fine de julio 2013 emeritiĝis.

Inter la plej gravaj evoluoj dum la oficperiodo de direktoro Mayer, ekde 1988, estas la translokiĝo de la kolekto kaj de la muzeo al Palais Mollard, la novkonceptado de la Esperantomuzeo kaj la komenco de la ampleksaj ciferecigoj de la biblioteka kaj muzea havaĵoj.

La komuna gvidado de la Literatura Arkivo kaj de la Kolekto por Planlingvoj, kiu restos ankaŭ estontece memstara je la kutima loko en Palais Mollard, ebligas valorajn kaj riĉigajn sinergiojn en enhava kaj arkiva rilatoj: Ambaŭ kolektoj dokumentas la 20-an jarcenton, precipe la intermilitan periodon, kaj diversajn aspektojn de lingvofilozofio. Ankaŭ rilate la praktikan arkivlaboron rezultiĝas multnombraj punktoj de kontakto pro la similaj objektotipoj en modernaj postlasaĵoj.

Krome magistro Bernhard Tuidier, fakulo sur la kampo de esperantologio kaj multjara kunlaboranto, estis nomumita teamestro. Li gvidas la laborojn en la interlingvistika fakbiblioteko kaj deĵoras kiel unua kompetenta fakulo por interesatoj kaj fak kolegoj.

La Kolekto por Planlingvoj kaj precipe la Esperantomuzeo estos ankaŭ estontece vivanta loko de renkontoj por ĉiuj, kiuj interesiĝas por niaj havaĵoj, muzeaj gvidadoj kaj kursoj.

Por demandoj:

Mag. Bernhard Tuidier, bernhard.tuidier@onb.ac.at, +43 1 53410-731

Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen.htm> kaj

<http://www.onb.ac.at/esperantomuseum.htm>.

Leopold Patek

Nova prezidanto de la Akademio



Profesoro Christer Kiselman [prononcu: Ĉi'selman] el la Matematika instituto de la Upsala Universitato (Svedio) estas elektita kiel la nova prezidanto de la Akademio de Esperanto (AdE) rezulte de la voĉdonado de 37 akademianoj.

Christer Kiselman ekde 1989 estas membro de AdE; lastatempe li oficis en AdE kiel direktoro de la sekcio pri faka lingvo kaj membro en la sekcioj pri gramatiko, pri la ĝenerala vortaro kaj pri

prononco.

La nova estraro de AdE estas kvarpersona:

Christer Kiselman, prezidanto
Probal Dasgupta, vicprezidanto
Brian Moon, vicprezidanto
Renato Corsetti, sekretario

Kiel direktoroj estis elektitaj:

Sergio Pokrovskij, Faka Lingvo
Bertilo Wennergren, Gramatiko
Markos Kramer, Ĝenerala Vortaro
Anna Lowenstein, Kontrolado de lerniloj
Alexander Shlafer, Lingva Konsultejo
Paul Gubbins, Literaturo
Probal Dasgupta, Prononco
Carlo Minnaja, Komisiono Historio de AdE
Nguyen Xuan Thu, Komisiono pri homaj nomoj

Universitata filmita kurso en Esperanto



En la pasinta jaro Amri Wandel, profesoro pri astronomio en Universitato de Jerusalemo, faris Esperant-lingvan prelegserion en kadro de la “Pekina Esperanta Astronomia Kurso-2012”.

En la studio de la Ĉina Radio kaj Televido estis faritaj 12 prelegoj, ilia daŭro estis sume ĉirkaŭ 40 studhoroj, kaj pri ili estis faritaj filmaj registraĵoj, kiuj ekde nun estas libere spekteblaj en interreto (post la komenca 10-sekunda ĉina reklamo).

Tiu videa kurso estas modelo-dona ne nur ĉar la interesan astronomian fakan enhavon povas utiligi studentoj ie ajn en la mondo – sed ankaŭ ĉar ĝi montras unu eblan vojon por reala kaj faka aplikado de Esperanto. Gratulon kaj dankon al la organizantoj pro la realigo, kaj ankaŭ al Amri Wandel pro la prelegoj!

Espereble ni baldaŭ havos plurajn tiajn kursojn en kadroj ankaŭ de AIS - aŭ de ISAE...

Urloj (www-adresoj) de ĉiuj 12 partoj de la filmo estas troveblaj en la priastronomiaj paĝoj de Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko, STEB: <http://www.eventoj.hu/steb/astronomio/index-astronomio.htm>

Szilvási László [Ret-Info]

Deziras korespondi

Alexander Martinez Agüero, Asociación Cubana de Esperanto, Apdo 48, Bayamo1, Bayamo, Granma, Cuba, C.P. 85100.

Mi deziras korespondi kun esperantistoj por praktiki la lingvouzon de Esperanto. Se oni ne praktikas – neniam oni povos paroli kaj skribi bone! Tio estas komenco de nia kontakto kaj ni ne scias, ĉu povas esti la komenco de granda amikeco.

Mia intereso estas interŝanĝi paperleterojn, bildkartojn, poŝtmarkojn kaj veran amikecon, mi ŝatas trovi verajn korespondamikojn per retroŝto kaj poŝtadreso, mi respondas rapide kaj mi skribas longajn leterojn.

Aĝo: 31

Profesio: Mekanika Inĝeniero kaj Magistro en la fako de desegna scienco per komputilo.

Hobio: Legi, skribi poemojn, leterojn, esplori, prelegi, fari esperantajn ekspozicion. Mi estas MEMBRO de UEA, ILEI, SAT.



Mi ricevis de mia japana amikino la supran bildon kaj la suban peton:

En mia domo nun s-ro Macumoto kaj mi kune okazigas kurson por komen-
cantoj. Sume 4 gekomencantoj nun lernas nian lingvon diligente. Tri el ili
estas ankoraŭ junaj, kaj unu estas mezaĝa. Mi volas trovi bonan kore-
spondanton por ili. Ĉu vi ne povos prezenti iun por ili? Ili volas korespondi
ne perrete sed perpoŝte. Se iu kiun vi scias volas korespondi kun japana
komencant(in)o, bonvolu prezenti al mi tiun samidean(in)on.

Bonvolu helpi la aferon, kaj sendi vian adreson al tmuto@lep.bbiq.jp.

Jerzy Kilijański

La patro de la dana Esperanto-movado

Ĉi-somere nia membro Bent Jensenius hazarde ekskursis en la tombejo de Søllerød kaj faris fotojn de la tombo de Frederik Skeel-Gjørling, “patro de la dana Esperanto-movado”. Li interkonsentis kun Mogens Rude Andersen ke ni publikigu la tekston de la faldfolio, kiun tiu skribis por ekskurso la 27-an de julio 2011 al Norda Selando por invitita internacia grupo. Fine mankis tempo por viziti la tombon, do la teksto restis neuzita.

En la faldfolio troviĝas ankaŭ la traduko de la Andersen-a fabelo “Prindsessen paa Ærten” laŭ Frederik Skeel-Gjørling kaj tiu de L.L. Zamenhof. Per ĝi oni facile konstatas, ke la Zamenhofs esperantigo okazis surbaze de ne tre fidela traduko (laŭ Paul Neergaard la germana Reclam-eldono). En la faldfolio ne estis loko por la dana originalo, kaj ĉi tie ni ankaŭ ne havas lokon por la tradukoj; sed nun oni povas konsulti ĉiujn tri versiojn rete ĉe <http://bit.ly/hcapizo>.

Frederik Carl Christian Ferdinand Skeel-Gjørling naskiĝis la 11-an de februaro 1876 en Kopenhago kiel la sola infano de nordjutlanda bienposedanto Frederik Carl Anders Ferdinand Skeel-Gjørling (1844-1907) kaj Theodora Amalie Wetzel (1851-1909). Ĝis la aŭtuno de 1907 li vivtenis sin en Aalborg kiel interpretisto kaj instruisto, ne nur ĉe sia propra lingvo-instituto, sed ankaŭ ĉe la komerca kaj teknika lernejoj de la urbo.

Skeel-Gjørling verŝajne esperantistiĝis en la 1890-aj jaroj. Kvankam la unua dana lernolibro de la Internacia Lingvo estas ellaborita de la ŝlesvigano Christian Nielsen (Vejbæk, 1827-1896) kaj aperis en 1890 en Flensburg, kaj la unua Esperanto-societo estas fondita de Peder Kristensen Toksvig (1851-1931) en Nykøbing Sjælland 1897, oni konsideras Frederik Skeel-Gjørling “la patro de la dana Esperanto-movado”. En 1904 aperis de lia mano *Esperanto-Dansk-Norsk Ordbog* (Esperanta-dana-norvega vortaro), du jarojn poste *Fuldstændig Lærebog i Esperanto* (Plena lernolibro de Esperanto) kun gramatiko, ekzercaro kaj laŭtema vortlisto dana-norvega-Esperanta. Nur kelkajn monatojn poste sekvis en la 3-voluma serio *Det Internationale*



(Portreto provizita de Torben Svendsen)

Hjælpeprog Esperanto (La internacia helplingvo Esperanto) kaj *Taleøvelser* (Parolekzercoj). Pri la lingvo Frederik Skeel-Giørling ellaboris multajn informajn artikolojn; ili aperis precipe en la jutlandaj gazetoj.

En la 1-a Universala Kongreso 1905 en Boulogne-sur-Mer li estis elektita kiel membro de la 95-persona Lingva Komitato. Li tradukis kelkajn el la fabeloj de Hans Christian Andersen; inter ili estas *La Princino kaj la Pizo* (1907).

Mallonge post la Bulonja kongreso la granda Kopenhaga gazeto Politiken sendis la ĵurnaliston Harald Schrøder al eksterlando kun la tasko serĉi informojn pri la Internacia Lingvo kaj ties adeptoj. Li vojaĝis ĉefe en Germanio kaj liveris tre favorajn raportojn. Aŭtune en 1907 Politiken okazigis 3-monatan kurson de Esperanto en la ĉefurbo kun Frederik Skeel-Giørling kiel instruisto. La kurso kostis 10 kronojn; partoprenis 412 personoj.

Unu el la rezultoj de la kurso estis la starigo de *Konversacia Esperantista Klubo* (KEK) en januaro 1908; ĝi tuj elektis Frederik Skeel-Giørling kiel honoran prezidanton. Samjare li estis kunfondinto de *Centra Dana Esperantista Ligo* (la nuna DEA). Post la kurso li restis en Kopenhago, kie li funkciis interalie kiel lingva konsilanto por *Esperantobladet Helpa Lingvo* (1907) kaj *Dana Esperantisto* (ekde 1908).

En marto 1910 Frederik Skeel-Giørling estis vokita al la Centra Oficejo en Parizo de Hippolyte Sebert, kiu baldaŭ sendis lin al Bruselo por reprezenti la Internacian Lingvon dum la tiea mondo-ekspozicio. La 14-an de oktobro 1910 Frederik Skeel-Giørling akcidente dronis en rivero Mozo. Kiel eta knabo li falis sur ŝtuparo; poste fortaj kapdoloroj lin konstante ĝenis. Kiel plenaĝulo li ofte faris longajn promenadojn kun la celo vere laciĝi kaj povi poste facile endormiĝi. En la fatala oktobra tago supozeble li estis tiom laca, ke li duondorme falis/iris en la riveron. Lia abrupta morto estis tre grava perdo por la dana Esperanto-movado. Frederik Skeel-Giørling ripozas en la tombejo de Søllerød norde de Kopenhago.

En 1901 li edziĝis al Anna Kirstine Larsen (1866-1926), sed la geedzeco daŭris nur 8 jarojn. La paro ricevis du filojn: Jørgen Frederik Christian Preben (1902-1965) kaj Jørgen Erik Holger Frederik Christian (1903-1977).

Mogens Rude Andersen – printempe 2011



7-a Mezorianta Esperanto-Kunveno

Vizitu Kartvelion kaj renkontu la mezoriantajn esperantistojn!

Renkontiĝo de esperantistoj el mezoriantaj landoj en Kartvelio en la jaro 2014-a.

Loko: Tbiliso.

Datoj: de la 5-a ĝis la 10-a de aprilo 2014, kun ebleco pri postaj ekskursoj dum la semajno.

Programo: prelegoj, ekskursoj, artaj aranĝoj!

Tute aparta konkurso pri kono de la poemego “Kavaliro en tigra felo” de Ŝota Rustaveli.

Aliĝoj kaj informoj ĉe: mezorianta.kunveno@esperanto.org
aŭ ĉe http://uea.org/vikio/La_Mezorientaj_Kunvenoj.





Mendo de revuoj por 2014

La jarfino proksimiĝas kaj nun estas tempo mendi revuojn.

Bonvolu pagi rekte al nia konto reg 3627, konto 645 7274, indikante la kodo(j)n kaj ankaŭ memori ke la limdato por pagi estas

la 1-a de decembro 2013

– post tiu dato ni ne sukcesos transigi la sumon antaŭ la 31-a de decembro.

Dankon !

Kodo	Nomo	Abonprezo
		(danaj kronoj)
OdE	Ondo de Esperanto	315.-
NV	Naturista Vivo	120.-
LJ	La Jaro	45.-
JA	Juna Amiko	120.-
Mon	Monato	399.-
BA	Beletra Almanako	275.- (3 numeroj en 2014)
FE	Femina	*
LF	Literatura Foiro	*

* Informoj ne ricevitaĵ



**8.-10. NOVEMBER
I BELLA CENTER**

BOGFORUM

fredag 10-19, lørdag 10-18, søndag 10-18 [Se mere på www.bogforum.dk](http://www.bogforum.dk) 